

Informilo de Julio-Aŭgusto 2020

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 47, julio-aŭgusto 2020

UEA lanĉis grandegan trimonatan Mondan Festivalon de Esperanto

Nuligo de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu devis okazi la unuan semajnon de aŭgusto en Montrealo, Kanado, produktis inversan respondon: okazas pli multa agado en la Esperanto-mondo ol iam antaŭe – kaj ĝi efektive rondiras la mondon. Lanĉite la 20-an de junio, trimonata virtuala Monda Festivalo de Esperanto ne nur inkluzivas tutan serion da aranĝoj ligitaj al Unuiĝintaj Nacioj, sed kunligas multajn aliajn aktivecojn de pluraj aliaj organizoj. La esperantista instruista ligo ILEI okazigas sian unusemajnan jaran kongreson rete, tiel multigante la nombron de partoprenantoj longe preter la nombroj atenditaj por surloka konferenco. La 76-a Internacia Junulara Kongreso havas similajn atendojn – kaj pli kaj pli da organizoj kaptas la okazon de tiu tutmonda festivalo, kiu entenos prelegojn, diskutojn, artajn aranĝojn, koncertojn, kaj multajn aliajn okazojn por aŭdi kaj paroli Esperanton.



MONDAFEST'2020
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO
20 JUNIO - 20 SEPTEMBRO

La lanĉo de 20 junio okazis antaŭ spektantaro de pluraj miloj da homoj tra la tuta mondo. La Festivalo prezentos plene internaciajn aranĝojn kaj ankaŭ regionajn renkontiĝojn, tiel faciligante pli efikan kontakton kun Esperanto-parolantoj je ĉiuj niveloj. Inter tiuj kiuj alparolis la malferman ceremonion estis Suba Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, **Fabrizio Hochschild**, nome de sia organizo. Li laŭdis la Esperanto-movadon pro ties internacia dialogo kaj engaĝiĝo kaj instigis al Esperanto-parolantoj partopreni en la tutmonda enketo nun realigata koncerne la estontecon de UN (<https://un75.online/?lang=epo>). La mesaĝo de s-ro Hochschild estas spektebla ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=kFufDNdgrXo>.

Prezidanto de UEA **Duncan Charters** alvokis al ĉiuj parolantoj de Esperanto, ke ili kunlaboru por konkuri la krizojn de hodiaŭ, ne nur KOVIM-19 sed ankaŭ armitan konflikton kaj klimatsanĝiĝon. Eksa UEA-prezidanto kaj nuna Reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, **Humphrey Tonkin**, refortigis la mesaĝon de Suba Ĝenerala Sekretario Hochschild, anoncante serion da aranĝoj kiuj ekzamenos la hodiaŭan UN kaj proponos viziojn de ĝia estonteco. La teksto de lia parolado troveblas ĉe <http://www.esperantoporun.org/parolado-de-humphrey-tonkin-mondafest-20-junio-2020/>. Pliaj komentoj pri la rilato de UEA kun Unuiĝintaj Nacioj estis prezentitaj de **Rakoel Maertens** kaj **Sara Spano**.

La malferma ceremonio, kunordigita de la Unua Vicprezidanto de UEA **Fernando Maia**, enhavis kontribuojn kaj muzikon el multaj mondopartoj, inter ili salutojn de estrarano de UEA **Jérémie Sabiyumva** (Burundo), kaj muziko el la Demokratia Respubliko de Kongo, Brazilo, Francio, kaj la Korea Respubliko. Dum la pasintaj kelkaj tagoj okazis Tago dediĉita al Mezoriento kaj Norda Afriko, organizita de la komisiono de UEA por tiu regiono, kaj Tago de Azio kaj Oceanio. Pri estontaj aranĝoj vidu <https://mondafest.net/programo/>

La Universala Kongreso de Esperanto tamen okazos kiel virtuala aranĝo de 1 ĝis 8 aŭgusto. Detalojn oni anoncos dum la nuna monato.

Paĝo de Facebook kolektas komentojn en Esperanto pri la estonteco de UN

La paĝo Facebook **UN75 en Esperanto**, lanĉita kunligite kun la enketo de UN pri la opinioj de la publiko pri la estonteco de UN, jam havas membrojn en 54 landoj, nome:

Alĝerio, Argentino, Bangladeŝo, Barato, Belgio, Benino, Bolivio, Brazilo, Britio, Bulgario, Butano, Ĉeĥio, Ĉilio, Etiopio, Fiĝio, Finnlando, Francio, Germanio, Grekio, Gvatemalo, Hispanio, Hungario, Irako, Irlando, Israelo, Italio, Kamboĝo, Kanado, Kolombio, Kongo D.R., Kostariko, Kubo, Laoso, Liberio, Litovio, Malajzio, Maroko, Moldavio, Nepalo, Niĝerio, Norvegio, Nov-Zelando, Pakistano, Palestino, Peruo, Pollando, Rusio, Serbio, Svedio, Tunizio, Turkio, Turkmenio, Ugando, Usono.

Ĉiuj parolantoj de Esperanto estas petataj partopreni en tiu ĉi kampanjo por difini la estontecon de Unuiĝintaj Nacioj en la venontaj 25 jaroj. Bonvolu ankaŭ partopreni la enketon ĉe <https://un75.online/?lang=epo>.

Vi estas mia heroo: Kiel infanoj povas batali kontraŭ KOVIM-19 estas havebla en Esperanto



La Esperanto-versio de infanlibro pri kontraŭbatalado de KOVIM-19 estas nun havebla, dank' al la laboro de la Dua Vicprezidanto de UEA, Trezoro Huang Yinbao, kaj teamo de tradukantoj, kiuj laboris kun UNESKO por produkti la version en Esperanto. La libro, verkita de Helen Patuck, estas projekto de la UN-rilata organizo Inter-Agenteja Komitato pri Mensa Sano kaj Psikologia Subteno-Konsila Grupo en Kriza Situacio. *Vi estas mia heroo: Kiel infanoj povas batali kontraŭ KOVIM-19* estas havebla en teksto, bildoj kaj sono, legata de Elsa Torres ĉe youtu.be/piFWPLjglCg, kaj en teksto kaj bildoj ĉe la retejo de la Komitato ĉe <https://interagencystandingcommittee.org/system/files/2020-05/My%20Hero%20is%20You%2C%20Storybook%20for%20Children%20on%20COVID-19%20%28Esperanta%29.pdf>

La sonlibro estas la unua en serio de sonlibroj, kiujn UEA preparas kunlabore kun la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).

Prestiĝa libro kuneldonata de Unesko kaj UEA

De ideoj al agoj, 70 jaroj de UNESKO estas prestiĝa trilingva libro (angla, franca, portugala) pri la tuta historio de la organizo, eldonita de Unesko en Brazilo en 2015. Trezoro Huang Yingbao, vicprezidanto de UEA, proponis en 2019 tradukigi la libron en Esperanton, kaj en novembro 2019, UEA kontraktis, ke ĝi estu kuneldonita de Unesko kaj UEA. Aldoniĝis poste traduko al la ĉina lingvo (kun la ideo, ke eblas estonte traduki ĝin al pliaj lingvoj), kaj Unesko petis, ke instanco sendependa de UEA kontrolu la tradukon (tion ĉi ni interkonsentis kun Esperanta PEN-Centro). La traduko estas ĝustatempe finkontrolita por apero en julio 2020, konforme al la subskribita kontrakto.

Suba Ĝenerala Sekretario Fabrizio Hochschild: Esperanto estas pli ol lingvo

“Esperanto estas pli ol lingvo,” deklaris Suba Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj Fabrizio Hochschild en siaj rimarkoj al la inaŭguro de MondaFest, la Monda Festivalo de Esperanto, la 20-an de junio: “Ĝi estas esprimiĝo de tutmonda solidareco kaj voko al agado por tutmondaj interkompreniĝo kaj civitaneco. Nun, pli ol iam ajn antaŭe, UN bezonas subtenon de la tutmonda komunumo de Esperanto-parolantoj.” Li aludis al sia malfeliĉo pri nuligo de la Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, kiun li planis ĉeesti. Jen la plena teksto de liaj komentoj:

Koran saluton. Mi ĝojas sendi ĉi tiun mesaĝon pri la lanĉo de la virtuala mondfestivalo de Esperanto.

Mia nomo estas Fabrizio Hochschild. Mi estas el Ĉilio. Mi gvidas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj marki sian 75-an datrevenon ĉi-jare en 2020.

Mi scias, ke tiu ĉi Festivalo naskiĝis el neceso, ĉar la Universala Kongreso de Esperanto, kiun mi planis ĉeesti, devis nuligi pro KOVIM-19. Sed mi kredas, ke tio, kio anstataŭas ĝin – tri monatoj da prelegoj kaj diskutoj pri Unuiĝintaj Nacioj 75-jara – estas eĉ pli bona, kaj mi ĝoje antaŭvidas la rezultojn de viaj diskutoj.

Esperanto ĉiam estis pli ol nur lingvo. Ĝi estas esprimiĝo de tutmonda solidareco kaj voko al agado por tutmondaj interkompreniĝo kaj civitaneco. Nun, pli ol iam ajn antaŭe, UN bezonas subtenon de la tutmonda komunumo de Esperanto-parolantoj.

Unuiĝintaj Nacioj fariĝos 75-jara ĉi-jare. Estas tempo de granda renverso en la mondo, same kiel estis kiam ni fondiĝis en 1945.

Multaj evoluoj kun kiuj ni hodiaŭ luktas estus neimageblaj al niaj fondintoj:

- ke homa agado ebligis tergloban temperaturan kreskon, je risko de miliono da specioj, inkluzive de la nia;
- ke novaj teknologioj radikale aliformigus la manieron laŭ kiu ni vivas, laboras, kaj interagas.

Sed multaj hodiaŭaj problemoj estus eĉ tro konataj: milito, dislokigo, grandpotencaj rivalecoj, koroda naciismo, diskriminacio, mistrakto.

Ni multe progresis dum la pasintaj 75 jaroj. Ni saltis antaŭen en edukado kaj en atakado de malriĉeco kaj malsato. Ni gajnis grandajn venkojn. La elimino de variolo per si mem savis milionojn da vivoj. Sed progreso ne ebenis, kaj malsukcesoj ofte tragikis. Post tri jardekoj da laboro por Unuiĝintaj Nacioj ĉekampe, mi portas la privilegiojn kaj ŝarĝojn de malsukcesoj kaj sukcesoj.

Finfine, Unuiĝintaj Nacioj reprezentas la homajn esperojn kaj aspirojn pri pli bona estonteco. Sed ankaŭ temis pri pragmata respondo de mondaj gvidantoj kiuj ekkomprenis, ke kunlaboro kaj kompromiso estas malpli kostaj ol milito.

Sepdek kvin jarojn poste, la kostoj de militoj kaj nekunlaboro kreskis grandege. Klimatŝanĝiĝo kaj nukleaj armiloj estas minacoj al nia ekzisto. Pandemioj kaj kiberkrimo ne respektas landlimojn. Ili ne estas solveblaj de unusola lando, kiel ajn granda aŭ potenca. Ni bezonas internacian kunlaboron por stimuli agadon kaj kunligi la eblecojn de la estonteco, ĉu temas pri levigo de la avantaĝoj de la novaj teknologioj aŭ konstruo de karbone neŭtrala mondo.

KOVIM-19 montris kiel esence estas labori trans landlimoj, sektoroj kaj generacioj. Ĝi malkovris nian fundamentan interdependon. Ni estas nur tiel fortaj kiel la homoj plej vundeblaj inter ni. Ni bezonas tutsocian respondon por fronti tiun ĉi krizon kaj certigi nian pli bonan

resaniĝon.

La pasintaj monatoj montris al ni, ke eblas grandegaj transformiĝoj kiam politika gvidado harmonias kun publika apogo. Ni konstruu sur tio. Venis tempo ne plu labori kiel kutime. Venis tempo ekpraktiki la

sindediĉon al estontaj generacioj kio esencas al la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

Jen la spirito laŭ kiu la Ĝenerala Sekretario deziras, ke ni marku tiun ĉi datrevenon – ne kiel feston sed kiel momenton de rekonsidero, de aŭskultado al “Ni la Popoloj”.

Ni lanĉis tutmondan konsultiĝon por kolekti la vidpunktojn de homoj el ĉiuj vivmanieroj kaj svarmakiri viajn solvojn al la defioj kiujn ni frontas. Mi esperas, ke vi ĉiuj partoprenos per nia unuminuta enketilo ĉe [UN75.online](https://www.un.org/75online/), inkluzive en Esperanto.

La rezultojn ni prezentos al mondaj gvidantoj en septembro 2020 kiam la ŝtatoj akceptos deklaron pri la 75-jariĝo. Tiu deklaro estos okazo prezenti alvokon al agado por sekurigi la estontecon kaj sendi mesaĝon de espero al homoj tra la mondo. Bonvolu helpi nin igi tiun ĉi momenton decida.

Dankon.

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj 20 junio 2020

Laŭ statistiko de Unuiĝintaj Nacioj, hodiaŭ 71 milionoj da homoj tra la mondo estis perforte dislokitaj de militoj, naturaj katastrofoj, kaj forpelo el siaj hejmlandoj. Ili plejparte loĝas en ŝirmejoj por rifuĝintoj, ofte kun vivosava subteno de UN. Ilia situacio fariĝis eĉ pli malfacila pro alveno de KOVIM-19. Ĉe multaj rifuĝintoj, socia distancigo ne eblas, mankas la ebleco de kvaranteno, kaj sanservoj kaj hospitaloj estas neadekvataj. En multaj mondopartoj, naciaj landlimoj estas fermitaj eĉ al tiuj kiuj prosperas: rifuĝintoj estas aktive repuŝataj kaj kalumniataj. Dum ĉiuj homoj frontas riskon pro KOVIM-19, la rifuĝintoj de la mondo estas inter la plej endanĝerigataj.

Kiel atentigis la Alta Komisionestro pri Rifuĝintoj, Filippo Grandi, “Se iam ajn ni memoru, ke ni vivas en interligita mondo, la koronaviruso tion rekte komunikis.” KOVIM-19, la Komisiono diras, “ne konas landlimojn, ne konas lingvaj barojn. Ĝi minacas ĉiujn homojn sur tiu ĉi planedo – inkluzive rifuĝintojn kaj aliajn dislokitojn.”

Unuiĝintaj Nacioj nomis la 20-an de junio Monda Tago de Rifuĝintoj. Ĉi-tage ni aparte memoras la multajn milionojn da homoj forigitaj el siaj hejmoj pro milito, perforto kaj naturaj katastrofoj. Universala Esperanto-Asocio solidariĝas kun multaj aliaj organizaĵoj por atentigi pri la neceso de internacia kunlaboro por alfronti la bezonojn de rifuĝintoj kaj labori por ilia paca kaj sekura reiro al siaj originaj loĝlokoj, aŭ ilia azilo en la landoj kie ili, senelekte kaj senkulpe, troviĝas.

Inter la multaj demandoj pli forte traktendaj estas la lingva problemo: multaj rifuĝintoj troviĝas en situacioj kie ili ne povas lingve komunikiĝi kun la ĉirkaŭaj homoj, inkluzive de registaraj funkciuloj, instruistoj, medicinistoj kaj krizolaborantoj. Kiel parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto, ni estas aparte konsciaj pri tiu neatento al adekvata alfronto de lingvaj diferencoj.

Okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj 2020, ni alvokas al registaroj, neregistaraj organizaĵoj, kaj tute aparte al Unuiĝintaj Nacioj mem, alfronti lingvajn demandojn pli rekte kaj en spirito de lingva justeco, nediskriminacio kaj humana konsento.

Kaj ĉefe ni alvokas al ĉiuj homoj subteni la laboron de Unuiĝintaj Nacioj por mildigi la sorton de rifuĝintoj en la nuna danĝera monda situacio.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041